

STARTO

N-ro 1/2026 (298)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



La 11-a internacia

Granda lokŝumado en Bratislavo

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IĈ): 00 44 30 34

Starto retroŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 400 Kč (Starto elektronike 290 Kč), B 300 Kč (elektronike 190 Kč), C 150 Kč, P 200 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 1700 Kč, rete: 900 Kč, rete por ĈEA-anoncoj: 500 Kč; Marĉek: 1900 Kč, rete: 1100 Kč, rete por ĈEA-anoncoj: 700 Kč, Cink por progresintoj 2950 Kč, rete: 1400 Kč, rete por ĈEA-anoncoj: 1100 Kč.

Aliĝoj: kurzy@esperanto.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: blindula, katolika, kristana, grupo por ciferecigado, (memstariĝis: handikapitoj kaj fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupa@esperanto.cz

Reteja grupo: redakce@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:
sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al:
muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Výbor ĈES:

Předseda: Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz; (koordinace a reprezentace ĈES, muzeum Svitavy)

Místopředseda: Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

Pokladník: Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ĈES)

Člen výboru: Leonarda Chaloupková, leonarda.ch@seznam.cz (kluby a sekce, konference, granty)

Člen výboru: Mgr. Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (spolupráce s mládeží, web)

Redaktor Starta: Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:

Milan Kolka, Bučovická 939/12
627000 Brno, tel. 608 421 404,
cefdelegito@esperanto.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Admi-
stras: Milan Kolka.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy,
muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

La vorto de la prezidanto

Estimataj samideanoj,



ni eniras en la novan jaron 2026. Mi volas esprimi al vi miajn plej sincerajn kaj fervorajn bondezirojn. Estas ĉiam kutime komence de nova jaro re-rigardi kaj taksi la pasintan jaron. La plej signifa evento por ni estis la kunorganizo de la sukcesa 110-a Universala Kongreso en Brno. Tiu ĉi aranĝo certe por ni ĉiuj estis defio kaj mi ĝojas, ke ni plenumis tiu ĉi taskon kontentige. Mi ŝatus danki ĉiujn miajn kolegojn, LKK-membrojn kaj multajn helpantojn pro ilia dediĉita laboro dum la kongreso. Mi kredas, ke nia entuziasmo daŭros dum la venontaj jaroj.

Ankaŭ ĉi-jare ni havas novajn defiojn kaj novajn celojn. Nunaj taskoj eble ne ŝajnas al iuj tiel grandaj kaj signifaj, sed nia movado ne temas nur pri organizado de UK, ĉu?

La ĉefaj celoj de nia Asocio estas la disvastigo de Esperanto inter la ĉeĥa publiko kaj la alirebleco de la riĉeco de ĉi tiu lingvo kaj ĝia kulturo al ĉeĥaj uzantoj, kaj inverse, la disvastigo de la ĉeĥa kulturo eksterlanden per Esperanto. Ni pripensu, kiel ĉiu el ni kontribuas aŭ povas kontribui al la plenumo de ĉi tiuj celoj.

Dum la preparado de la kongreso, ni sukcesis regule informi la ĉeĥan kaj esperantistan publikon pri niaj agadoj. Ĉu ni povos daŭrigi la ritmon? Ni teknike lernis ĝin, ni nur bezonas lerni trovi interesajn temojn el la ĉiutaga vivo ankaŭ ekster la kongreso. Tio ne estas la tasko nur de la komitato. Ĉiu membro aŭ

subtenanto de la movado povas partopreni.

Eble por ĉiutaga kunlaboro mankas al ni emon. Interese, ke la ideo de granda celo instigas homojn kunlabori kaj estas tre inspiriga. La komuna celo ofte unuigas individuojn kaj kunlaboro kunigas homojn kun diversaj kapabloj, ideoj kaj perspektivoj. Tamen, en la ĉiutaga vivo eblas antaŭvidi multajn obstaklojn, kiuj minacas la kunlaboron. Kialoj de nekunlaboreco povas esti diferencaj. Iam temas pri rivaleco, iam pri diferencaj valoroj aŭ nur pri malbona komunikado. Domaĝe, ke ni ne kapablas solvi ĉiutagan kunlaboron tiom entuziasme kiel grandajn projektojn.

Tio ne estas problemo nur de Esperantujo. Rigardu ĉirkaŭ vi kaj vi vidas, ke la homa socio fariĝas pli kaj pli dividita. Tutegale, ĉu temas pri politiko aŭ ekonomio aŭ alia afero. Homoj kutimiĝis unue serĉi erarojn de alia flanko ol serĉi komunan solvon. Disputado estas konvena afero en ĉiu fako, se ĝi gvidas je rezulto. Bedaŭrinde ofte anstataŭ disputado estas nur kverelo kun unusola celo malhonori la kontraŭulon.

Sed Esperanto estas lingvo de interkompreniĝo, do estu esperantistoj bona ekzemplo por senĉese dividata mondo kaj klopodu unue serĉi, kion vi havas komunan. Kaj nur post tio solvu reciprokajn diferencojn.

Ne forgesu, ke unueco estas la kerno de la sukcesoj. Ĉu vi aŭdis iam pri sukcesa teamo, kie ili senĉese kverelas? Nur teamo kun kunordigo, komunikado kaj reciproka subteno povas atingi eĉ la plej ambiciajn celojn.

Mi esperas, ke kiam ni aŭtune kunvenos je konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Poděbrady, ni povos fanfaroni per sukcesa komuna laboro.

Penso pri la estonteco nepre elvokas la ideon de plibonigo. Mi esperas, ke ĉi tiu nova jaro alportos bonfartron, sukceson kaj eblecojn por ĉiu el ni. Ni daŭrigu labori kune por realigi niajn celojn kaj kredo en niaj kapabloj. Kaj ankaŭ en nia kapablo transformi defiojn en ŝancojn.

Kun la plej sinceraj bondeziroj por la nova jaro,

Mgr. Ing. Jiří Tomeček
Prezidanto de ĈEA



La komitato de ĈEA kunvenas regule rete ĉiumonate por solvi taskojn.

En januaro ni renkontiĝis persone ĉe la Esperanto-Muzeo en Svitavy kaj diskutis, interalie, pri internacia printempa kunveno en la urbo Olomouc.

Ĉeestis ankaŭ la nova ĉefdelegito.

Komuna konferenca renkontiĝo Ĉeĥa-Germana Olomouc 22 – 25 majo 2026

Jam ĉe la konferenco de ĈEA en Prudká en 2023 ni diskutis komunan konferencon kun GEA kaj eble renkontiĝon kun aliaj esperanto-parolantoj el najbaraj landoj. Multjaraj esperantistoj memoris kaj laŭdis la dulandan komunan renkontiĝon en Karlovy Vary (1993) kaj trilandan en Břeclav (2012).

Sed poste venis la UK-organizo en 2025 kaj, krome, ĈEA havis balotkongreson tiutempe, do ni devis prokrasti la komunan eventon. Ni revenis al diskutado pri la eblecoj de la renkontiĝo lastjare en Brno, kiam la germanoj, kaj ne nur ili, „plendis“ pri la riĉa programo, kiu ne permesis al ili vidi ĉion. Ekzemple multaj ne havis tempon viziti nian Esperanto-Muzeon en Svitavy.

Ni komencis serĉi komunan daton kaj lokon, kiuj taŭgus por kiel eble plej multaj interesatoj. Konsiderante la prezojn, ni preferas renkontiĝon en Ĉeĥio. Konsiderante la distancon, la germanoj preferas plilongigitan semajnfino. Tio signifas semajnfino, kiu povas esti kombinita kun unu el iliaj ekleziaj festotagoj. La elekto falis je Pentekosto, kiu ĉi-jare okazas la 25-an de majo. Do la komuna renkontiĝo okazos de vendredo la 22an ĝis dimanĉo la 24an de majo kun ebleco resti ĝis lundo la 25an de majo.

Tiam restis nur trovi lokon, kiu ofertus loĝadon por cent partoprenantoj, estus facile atingebla per publika transporto, kaj ne estus multekosta turisma centro.

La urbo Olomouc ofertas ĉion ĉi. Ĉi tiu urbo estis ankaŭ la celloko de ekskursoj dum la UK en Brno, kiun multaj kongresanoj ne havis tempon viziti.

La urbo Olomouc estas antikva urbo. La ĉirkaŭaĵo de la vadejo trans la rivero Morava estis loĝata jam en la neolitika tempo. Jam ekde la 11-a jarcento ekzistis en tiuj ĉi lokoj centro de sekulara kaj eklezia potencoj por vasta teritorio. Dum multaj jaroj la urbo estis fortikaĵo kaj danke al tiu karaktero, kiu travivis ĝis la 19-a jarcento, la urbo konservis sian unikan historian karakteron.

Granda parto de fortikaĵaj muregoj estis forigita nur post industria revolucio, kiam fabrikoj estis lokitaj ekster la urbon. Kaj saĝaj urbanoj sur la loko de urburegoj aranĝis parkojn. Do hodiaŭ la centro de la urbo estas ĉirkaŭita per vastaj parkoj.

Esperanto-movado havas longan tradicion en la urbo. La unua kurso okazis jam en la jaro 1908 kaj tri jarojn poste estis fondita la unua Esperanto-rondo „Bohema klubo esperantista“. En la jaro 1932 okazis en la urbo la 5-a kongreso de ĉeĥoslovakaj esperantistoj dum kiu estis plantita Esperanto-arbo (Liriodendron) en la parko *Smetanovy sady* (Smetana-parko) kun granita, pli ol dumetra memorŝtono staranta antaŭ la arbo.

En la jaro 2006 ĉi tie okazis konferenco de ĈEA, kiam ni loĝis en *Hotelový dům* en la strato *Velkomoravská*. La hotelo

gastigos nin ankaŭ nunjare, same kiel la restoracio Fontana, kie ni tiam renkontiĝis. Detalajn informojn kun ebleco aliĝi frue aperos je nia ret-paĝaro kaj la informo estos sendita al nia membraro per Retkomunikoj.

Karaj esperantistoj, ni invitas vin partopreni la printempan renkontiĝon en la bela urbo Olomouc! Ĉi tiu evento estos mirinda ŝanco por renkonti samideanojn el najbaraj landoj, dividi ideojn, kaj festi la unuecan spiriton de Esperantujo. Ne maltrafu ĉi tiun unikan okazon por kontakti, lerni kaj ĝui!

Mgr. Ing. Jiří Tomeček
Prezidanto de ĈEA

Kion faras la komitato

La komitato de ĈEA kunvenis dufoje rete ekde sia elekto en Havířov kaj en januaro ni kunvenis persone en Svitavy.

La ĉefaj temoj diskutitaj dum ĉi tiu periodo inkluzivis eventojn en la muzeo, ekspoziciajn temojn kaj la daton de solena malfermo de la ĉi-jara ekspozicio pri Universalaj Kongresoj en Ĉeĥio. La rekonstruo de Biblioteko Ottendorfer, kie troviĝas nia muzeo, estas preparata jam de pluraj jaroj. La preciza amplekso kaj dato de la rekonstruado ankoraŭ ne estas determinita. La eblecoj varias de la plej malbona scenaro de provizora fermo de nia muzeo ĝis la ebleco, ke nia ekspozicio tute ne estos trafita de la rekonstruado. Bedaŭrinde, la rekonstruo povus okazi en la jaro 2028, kiam ni volas festi la tridekjaran agadon de la muzeo.

Alia temo diskutita dum la komitataj kunvenoj estis la preparado de la ĉi-jara konferenco de nia Asocio en Poděbrady.



Esperanto-muzeo Svitavy

Emeritoj en la Muzeo

Unu el la ĉefaj taskoj, kiujn nia Klubo de Amikoj de Esperanto en Svitavy starigis al si por 2026, estis evoluigi kunlaboron kun aliaj interesorganizoj. Kaj ni plenumas ĝin ekde la komenco de la jaro. Nia reprezentanto akceptis inviton al la jara membrokunveno de la Ĉeĥa Turista Klubo en Ústí nad Orlicí, kie en la diskuto, interalie, li invitis turistojn viziti la Esperanto-Muzeon okaze de la malfermo de la turisma sezono en la regiono Pardubice, kiu ĉi-foje okazas en Svitavy.



La sekva paŝo en la kunlaboro estis komuna rondiro de la Urba Muzeo kaj Galerio - MMG fare de membroj de la organizaĵo Emeritoj de Ĉeĥio el Polička, kiun ankaŭ ĉeestis membro de nia klubo, s-ro Sýkora. Post interesa klarigo pri la unika betlehemo de Svitavy, ni povis vidi multajn aliajn sur la unua etaĝo de la muzeo, el diversaj landoj kaj materialoj. De juglanda betlehemo, trikitaj kaj kroĉetitaj, trans maŝine faritaj, ĝis betlehemo, kiun la ĉiĉeronino mem faris el diversaj specoj de pasto. Belege! Parto de la MMG-turneo estis turneo de la konstanta ekspozicio de lavmaŝinoj, kie

la maljunuloj ofte rememoris, ke ili ankoraŭ memoras tion aŭ alion, havis ĝin aŭ eĉ ankoraŭ havas ĝin hejme. Ni ankaŭ haltis nelonge ĉe la materialoj rilataj al Oskar Schindler.



Post la MMG-turneo, la tuta grupo iris al la Esperanto-Muzeo, kie ili aŭskultis interesan paroladon de la klubprezidanto, sinjorino Dvořáková. La partoprenantoj eksciis multajn interesajn aferojn ne nur pri la historio de la Esperanta movado kaj ĝia fondinto L. Zamenhof, sed ankaŭ pri aktualaj eventoj en la Esperanta movado, pri la evoluo de kunlaboro inter Esperantaj parolantoj trans kontinentoj.

Poste ili havis la ŝancon rigardi individuajn ekspoziciojn rilatajn al Esperanta literaturo kaj mondaj kongresoj, sed ili ankaŭ vizitis la ekspozicion pri la agadoj kaj laboro de la klubo kaj la agadojn de kelkaj el ĝiaj membroj. La fakton, ke la prelego plaĉis kaj ke la vizitantoj el Polička interesiĝis, pravas ankaŭ la bela enskribo en la gastlibro. Ĉi tio certe ne estas la lasta komuna evento, ĉar la klub-representantoj jam estis invitataj al la ĉiujara membrokunveno de la organizaĵo Emeritoj de Ĉeĥio en Polička. Ni ĝojas akcepti ilian inviton.

M. Sýkora

Esperanto restas en la koro

Komence de ĉi tiu jaro, Xochitl Yin el Meksiko vizitis la Esperanto-Muzeon. Ĝi ne estis la unua vizito el tiu lando. La solenan malfermon de la muzeo en 2008 ĉeestis meksika skoltino, kiu estis intervjuita de kabla televido. Jen eliraĵo el letero de Xochitl Yin:

Mi lernis Esperanton en mezlernejo. Bedaŭrinde, la instruplano ŝanĝiĝis kaj la lecionoj estis ĉesigitaj. Tamen, Esperanto restis parto de mia vivo. Mi ĉiam sentis, ke ĝi estas lingvo, kiu esprimas la homan deziron al kompreno, egaleco kaj frateco inter homoj.

Mia vizito al la muzeo kaj via letero revekis en mi la deziron reveni al la studado de Esperanto kaj samtempe subteni ĝian disvastiĝon en mia proksima ĉirkaŭaĵo kiel rimedon por malferma kaj amika komunikado. Dum mia restado en Ĉeĥio, mi dediĉis min al lernado pri la historio de urboj kaj vilaĝoj en la regiono Svitavy, mi ankaŭ vizitis la belan naturan areon de Toulovcovy Maštale kaj la urbon Brno. Ĉi tiujn spertojn ebligis la malavareco kaj gastamo de la familio Pavlik (Kamila kaj Milan) loĝanta en Polička, kiujn mi memoras kun profunda dankemo.

Min tre impresis la homa malfermiteco, kultura riĉeco kaj respekto por la historio, kiujn mi renkontis en via lando. Svitavy ĉiam havos specialan lokon por mi.

Dankon pro via kuraĝigo kaj invito al plua korespondado. Mi estos tre feliĉa se ni restos en kontakto.

Mi estis tre kontenta, ke sinjorino Xochitl Yin ankaŭ elektis viziton al nia muzeo kiel unu el la celoj de sia vojaĝo. Bedaŭrinde, nia konversacio okazis en la

angla, kun Jakub Vrána de MMG Svitavy kiel nia tradukisto. Ŝi prenis foton de la kontaktoj de esperanto-parolantoj en Meksiko el la jarlibro. Tamen, sinjorino Xochitl Yin entuziasmiĝis pri la agadoj kaj internacia kunlaboro de la muzeo. Interesa fakto estas, ke ŝia praavo venis el Ĉinio kaj ĝuste kun ĉi tiu lando nia klubo plej multe kunlaboras, danke al la fakto, ke nia klubano estas Li Huang, kiu naskiĝis en Pekino. Mi kredas, ke ni baldaŭ revidos nin, ekzemple ĉe la monda kongreso en Graz, Aŭstrio, ĉi-aŭguste.

Libuše Dvořáková

Marcipana Kristnasko

okazis la 7-an de decembro 2025 en la Esperanto-muzeo por la publiko (infanoj kun la gepatroj) sub gvido de Anna Vyšínková el Vracov.



Iam mi mortos

Tiun ĉi fakton, kiu estas ankoraŭ neevitebla, devos pli aŭ malpli frue alfronti ĉiu el ni. Tio koncernas ankaŭ nin, kiuj redaktas la Vikipedion aŭ en Esperanto aŭ en aliaj lingvoj. Homoj ĝenerale ŝatas la rezulton de nia laboro – la plej granda enciklopedio en la historio de la homaro – sed kiom da ili pensas pri tio, kiu anstataŭos nin, kiam ni ne povos labori plu?

Vikipediisto kun la kromnomo WhatamIdoing verkis anglalingvan eseon kun la sama nomo "I am going to die" aŭ "Iam mi mortos". En tiu eseo ŝi rigardas la statistikon de uzantoj, kiuj iam registriĝis en anglalingva Vikipedio kaj observas, kiom longe ili sukcesas redakti kaj kiom da redaktoj ili faras entute. Ŝi rimarkis, ke ju pli aktiva redaktanto oni estas, des pli da novuloj necesas, por ke inter ili aperu almenaŭ unu, kiu kontribuos per la sama kvanto da redaktoj.

La statistiko diris jenon:

se vi faris nur 10 redaktojn, bezonatas 20 novaj uzantoj kun almenaŭ 7 redaktoj por trovi unu uzanton, kiu faros almenaŭ 10 redaktojn entute kiel vi

se vi faris 100 redaktojn, oni bezonas 100 novajn uzantojn kun almenaŭ 30 redaktoj

se vi faris 1 000 redaktojn, oni bezonas 1 000 novajn uzantojn kun almenaŭ 300 redaktoj

se vi faris 10 000 redaktojn, oni bezonas 4 000 novajn uzantojn kun 1 300 redaktoj

se vi faris 25 000 redaktojn, oni bezonas 10 000 novajn uzantojn kun 3 000 redaktoj

se vi faris 50 000 redaktojn, oni bezonas 20 000 novajn uzantojn kun 6 000 redaktoj

se vi faris 100 000 redaktojn, oni bezonas 100 000 novajn uzantojn kun 30 000 redaktoj

La nombroj estis konkluditaj konsiderante la anglalingvan Vikipedion, kiu estas pli granda ol la Esperanta, do por Esperanto-Vikipedio la nombroj povus esti malpli grandaj, sed tio ne signifas, ke la situacio estas pli facila, ĉar ankaŭ esperantistoj estas malpli multaj en la mondo ol anglalingvanoj, sed la ĝenerala rilato certe validas ankaŭ por ni – ju pli da redaktoj oni faras, des pli da novuloj necesas por eventuale anstataŭi onin.

Tial necesas, ke ĉiu, kiu havas eĉ nur bazan intereson pri daŭra evoluo de Esperanto-Vikipedio, almenaŭ iam provu mem redakti ĝin. Supre de ĉiu paĝo troviĝas la butono "Redakti" (aŭ la ikono de skribilo), kio malfermas la redaktilon, similan al teksto-redaktiloj en konataj programoj aŭ retejoj. Por nura provo oni eĉ ne bezonas krei konton (krom kelkaj esceptaj paĝoj), sed por pli daŭra redaktado indas krei ĝin. Uzante la konton (kiu eĉ ne devas esti kreita rilate al via vera identeco) vi povas gajni reputacion en la Vikipedia komunumo, kio plifaciligas ĝeneralan kontrolon de la ŝanĝoj, kiuj en Vikipedio okazas.

Vi ne devas redakti multe – nur tiom multe kiom vi povas kaj volas. Eble vi iros kun ni tiun vojon nur mallonge aŭ dum kelkaj jaroj. Ĉiukaze vi estos sur tiu vojo kun la grupo de homoj, kiuj dediĉas sian tempon al kreo kaj vivteno de verko kun granda signifo kaj por nia komunumo kaj por la ĝenerala mondo. Kaj kiu scias – eble tiu sperto ŝanĝos vian vivon por ĉiam.

Noto: Tiu ĉi artikolo ekestis por montri la ĝeneralan fenomenon kaj neniel rilatas al ies ajn persona sanstato aŭ ies ajn spertoj de la pasintaj jaroj.

Iam mi mortos © 2026 de Václav ZOUZALÍK estas eldonita sub la permesilo CC BY-SA 4.0.

Por vidi kopion de la permesilo, vizitu <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/deed.eu>>. Origine eldonita je <<https://esperanto.wiki/2026/iam-mi-mortos>>.



foto: © 2015 Diliff; CC BY-SA 4.0

La biblioteko povas fariĝi senutila se ne aperos novaj homoj, kiuj aldonos novan enhavon al ĝi.

INTERNACIA TRADUK-KONKURSO “VEJDO” 2026

La konkurso estas dediĉita al la memoro de Prof. Vejdo (Wei Yida, 1947-2025), honora membro de UEA, kaj celas subteni altkvalitan tradukarton en Esperanto. La konkursaĵojn bonvolu sendi al info@literaturavivo.com ĝis la 1-a de junio 2026. Kondiĉojn vi trovos ĉe la [retejo de la konkurso](#), la traduko ne rajtas esti farita kun helpo de artefarita intelekto. Vidu ankaŭ [CEA-retejon](#).

Laŭ Gazetara Komunikado de UEA n-o 1283

Estu elkore bonvenaj en la
SABLA PRINTEMPO
en Písek sabate 11.4.2025
inter 10:30 kaj 17:00

*„Esperanta librokulturo
en la 21-a jarcento“*



Atendas vin:

- programo kaj ekspozicio en la Urba Biblioteko
- komuna tagmanĝo
- eta urbopromeno kaj vizito de la nova kluba biblioteko/arkivo
- literatura/muzika posttagmezo kun prezentoj, legado, partumado kaj bona kafo kaj teo

Kontribuo por organizaj elspezoj 100,- CZK.

Posttagmeza refreŝiĝo senpaga.

Tagmanĝon ĉiu pagos memstare.

Por detaloj interesatoj bv. skribi kaj aliĝi ĝis 4.4.2026

ĉe pisek@esperanto.cz.

Nome de la EK „La Ponto“ antaŭĝojas vin

Pavla Dvořáková.



Bonvenon al OOMOTO

Eseo de Margit Turková

OOMOTO – kia mistera vorto...

Ni demandis, ĝis ni eksciis, ke oomotoj estas ankaŭ esperantistoj, ĉar ili partoprenadis en multaj universalaj kongresoj... Ni troviĝu en la tempo, kiam ni pli profunde konatiĝis kun tiu-ĉi fenomeno.

Estis la jaro 2007 – la UK estis preparata en Jokohamo (Japanio). La vojaĝ-agentejo KAVA-PECH organizis internacian karavanon: ĉeĥoj, slovakoj, hungaroj, germanoj, italoj (-inoj). La programo estis: unu semajno en KYOTO, unu semajno en JOKOHAMO. Inkluzive grimpon al la monto FUDŽISAN – la faman FUĜI-MONTOn. Pri mi persone: mi ne estis diligenta en preparo por la vojaĝo, kvankam miaj amikoj estis tre helpemaj. Josef Trojan (estro de nia EK Prago) enmanigis al mi la japanan gramatikon el sia „vojaĝarkivo“ (ĝis hodiaŭ mi ĝin ne malfermis). Ĉestmír Vidman, poeto, kiu multfoje estadis deĵorcele en Japanio (sed komunikis tie anglalingve) kun ĝoja ekscito rememoris sian restadon en la lando, kaj lia poezio-preta cerbo tuj eklaboris, kaj eldonis jenan rezulton:

1. Li estis ŝercemulo; mi prezentas lian elpenon por iom amuzi mian legantaron... (Rim.: Ĉ.V. ne regis Esperanton, tial b.v. akcepti la ĉeĥlingvan originalon):

Unue redaktora klarigo de la ŝerco:

Japanaj jakoj. Jako estas ĉeĥe **sako** kaj la frazo **ŝiju sako** (mi kudras jakon) sonas por ĉeĥaj oreloj japanece. La ŝerco rakontas pri tajloro, kiu portis por moŝtoj

belegajn jakojn, sed estis atakita de rabistoj. Malespere li kriis: Ho jakoj! (ĉeĥe: Ó saka!). Kaj tiel estiĝis la urbo Osaka, kie estas kudrataj la plej belaj jakoj.

Japanské sako

*Horní část pánskéko oděvu se označuje
jako*

kabát neboli sako.

I v Japonsku se krejčí dělí

na ty, co šijí kalhoty a na ty, co dělají

kabáty.

V japonštině: ŝiju-nohavice a ŝiju-sako

Pak už je tu jen to společné jméno

pro vše, co je krejčími vytvořeno.

Kdysi krejčík vezl panstvu saka.

Nebyla to práce ledajaká,

každý na ně s obdivem se dívá.

Přepadla ho banda loupeživá.

Krejčík volá lítostivě: „ó, ó, saka“ ...

A tak vzniklo město ÓSAKA.

Nejlepší jsou saka z Ósaky.

Jsou to hotové zázraky.

Šiju-sako saka užije.

Ať si jich každý dobře užije.

2. Mi kredas, ke la legantoj prenas jenan ŝercon kun bona volo. Ĉar nun mi volas prezenti la poeton Ĉestmír Vidman en „elegia poemo“, per kiu li mem esprimis nostalgion por la vidita kaj mian scivolemon por la vidota: por la grandioza miraklo – la Monto. Kaj mi samtempe volas prezenti la tradukiston – Jaroslav Krolupper. Dank'al li ni povas ĝui la poemon en Esperanto.

Fudži

*U moře mohutně se vypíná
Posvátná hora hor
Pod ní rýžová krajina
Až po obzor*

*Snem každého je vystoupit
Až na vrchol a kraj pozdravit
Při ranním rozednění
Což lehký úkol není*

*Den a noc se stoupat musí
Ale nikdo nehartusí
Pozvolna se vleče tenhle pochod husí
Jen ať to někdo zvládnout zkusí*

*Zvlášť pro našince jde to ztěžka
(dvakrát by se sem vešla česká Sněžka)
Takže předem neustále
Trénovat se musí vytrvale*

*Také dechem cvičit houževnatost
Překonávat lidskou slabost
Stoupat rozvázně ale neúnavně
Až konečně slunce objeví se slavně*

*Překonat únavu a lenost
Všední a šedou každodennost
Napravit své síly
(i když snad ochabují chvíli)*

*A být včas v cíli
Paprsky světla už se probudily
Nad japonskými ostrovy jako jejich
máma
Tyčí se hora Fudžijama*

Čestmír Vidman 1.4.07

Fuji-monto

*Ĉe maro nin surprizas
Masiva sankta monto
Sub ĝi pejzaĝo riza
Ĝis horizonto*

*Supreniri ĉiuj revas
Poste ili supre salute manon levas
Al la lando de aŭroro
Nepras tie ĉi fervoro*

*Tagon nokton oni devas iri
Sen ĝemplori sen suspiri
Pri la lanta marŝo ansero povas miri
Estas malfacile monton tuj akiri*

*Tiu tasko por ni estas ambicia
(nur duona estas Neĝmont' bohemia)
Do ekstaras postulo insista
Pri antaŭa trejnado persista*

*Spiron trejni volon plifortigi
De malforto sin senigi
Supreniri pace kaj senlace
Ĝis la suno tuj aperos grace*

*Laciĝon pigrecon superi
pro ordinareco ne suferi
Streĉi siajn fortojn
Malfortiĝintajn de komforto*

*Por al celo alporti raportojn
Elsaltis sunradioj jam kiel risorto
Patrineca por ĉiuj japanoj
Elstariĝas la Fuĵi-vulkano*

Esperantigis Jaroslav Krolupper

El multaj emocioj, kiujn elvokis en ni Fuĵi, estu dirita nur: kvankam la Monto montriĝas akre pinta – ĝi havas vastan krateron kiel ĉiuj neaktivaj vulkanoj...

Ni estu ĉe OOMOTO

Ni estis gastoj de oomotanoj ĝuste pro tio, ke ligas nin la Lingvo.

Sed Esperanto estas nur ilo por kompreno de postuloj kaj celoj, kiujn ni klarigu sub la titolo:

Kio estas OOMOTO.

OOMOTO estas movado de religia-spirita-societa karaktero. Ĝi disvolviĝis post kiam la profetino NAO DEGUĈI en la jaro 1892 ricevis de la SPIRITO unuajn komunikojn. Ŝia disĉiplo estis edzo de ŝia filino, sed poste la spiritan gvidadon transprenis nur virinoj en la familio. Ĉi-tempe estas la kvina. La movado havas siajn filiojn tra la mondo. Krom aliaj estas uzata ankaŭ Esperanto por disvastigi noblajn spiritajn ideojn, kiuj sonas jene (citaĵo):

La vorto OOMOTO mem signifas „La Granda Fonto“. Kvankam en Japanio radikiĝis ŝintoismo, la religio multiisma (el 6-9 jrc.), OOMOTO-movado instruas, ke ĉiuj dioj eliras el unu Fonto (DIO), kiu trapenetas la tutan kosmon. La celo de la homo (homaro) estas unuiĝi kun Dio, ke estu sur la tero estigita Lia regno.

OOMOTO aktivigas interreligie kaj klopodas antaŭenigi interreligian kunlaboron.

Itinero de nia vizito ĉe OOMOTO

La movado havas du centrojn:

AJABE, en kiu la medio-profetino ricevis la unuajn komunikojn.

La loko estas spirit-eduka centro de la movado.

KAMEOKA. Organiza-administra centro.

Unue ni veturis (el KIOTO) al AJABE, kie estis preparita digna / grava programo:

La ĉeesto ĉe la religia rito en la sanktejo ĈOOSEI-den

Komuna fotado antaŭ la Sanktejo

Tagmanĝo en la Centro de OOMOTO

Partopreno de prelego pri OOMOTO

Ad 1) Unu reprezentanto de ĉiu nacio (el nia grupo, kiun elektis Petro Chrdle) ricevis pinio-branĉeton (simbolo de pureco) kiun lokis sur la altaron. Ni estis instigitaj aktive kunesti la ceremonion; tial ni ricevis la tekston de la Preĝo, kiun preĝis la pastro. La Preĝo nomiĝas **AMACU-NORITO** kaj ĝia senco estas jena (citaĵo):

Ĉi tiun grandan universon la absoluta Vera Dio (Kreinto) eterne saturas per Sia virto. Li regas ĉiujn diojn por gardi la universon. Nur tiuj: La aktiveco de Liaj spirito (Kamuroge) kaj korpo (Kamuromi) ĝis kie manifestiĝis kiel Dio Izanagi (Kam-Izanagi-no-mikoto) kaj ĉi tiu Dio senĉese agadas por la purigado de la universa naturo. Do, la dioj de Haraido, kiuj, laŭ Dia volo, dividas inter si la metabolajn funkciojn de la universo, bonvolu elpurigi ĉiujn kontraŭ-diajn aferojn: pekojn, makulojn ktp. Kaj ankaŭ ĉiuj dioj ĉielaj kaj teraj bonvolu kune kunlabori, ni petas.“ Jen, kiel klarigite, la esenco de ĉi tiuj preĝvortoj konsistas en la peto al la ĉielaj kaj teraj dioj, ke ili elmontru la di-virton por purigado...

Kiam ni kaptis la finajn vortojn de la preĝanto:

Oomoto Sume-Oomikami – ni post-ripetis: „mamori tamae sakihae tamae“ (du foje).

Kannagara Mamiĉi-ijahiro – ni post-ripetis „Ooicuki-kuninaohinuŝi-no-Mi-koto / mamori tamae sakihae tamae“ (du foje)

Kannagara – ni postripetis: „Tamaĉihae mase“ (du foje)

Ad 2) Ni fotiĝis. Ni estis 24 esperantistoj diversnaciaj. Kaj ni havis la ĉiĉeronon TATSUOn, kiu de la komenco, el Jokohamo, afable prizorgis nin. Li jam ne estas inter ni, sed en la ĉielo esperanta. La danko al li estu esprimita almenaŭ en jena artikolo!

Ad 3) Poste ni tagmanĝis... La menuo estis specife japana: fiŝfileto – kaj algoj (almenaŭ en la supo)...

Ad 4) En la prelegejo oni sidas sur planko... (La posttagmezan dormeton ĝuis nur tiuj, kiuj sin apogis al la muro).

Poste ni travojaĝis al la menciita dua loko de OOMOTO – al KAMEOKA. Kiel jam dirite, tie troviĝas eduka centro – do oficejoj, lernejoj kaj prelegejoj. La loko estas ligita kun la dua fama nomo – la estro Onisaburo Deguĉi, estas tie dokumentita malfavora historio de la movado (simila al la esperanta!). Ankaŭ ĉi tie staras nobla sanktejo. Oni omaĝis „la tagon de purigado“, do alvenadis la disĉiploj. Siajn preĝojn ili subtenis per reciproka gastigado – do ni, liaj gastoj, estis ankaŭ regalitaj per riza vino kaj buletoj. Sur teraso de la sanktejo „el-peladis demonojn“ la grupo per sia tambura „muziko“.

Per kora dankesprimo al japanaj esperantistoj rememoras M.T.

Ekspozicio „ESPERANTO - FENESTRO EN LA MONDON“ spekteblas surrete

Estetike alloga kaj informe valora ekspozicio de bildkartoj kaj korespondajoj de membroj de la Esperantista Klubo en Havířov, profesie aranĝita de ĝia prezidanto Zdeněk Heiser, estis publike prezentita aŭtune 2025 en la urba Komerca Centro Elán kaj en oktobro ĝi estis ankaŭ persone vizitata de la partoprenantoj de la ĈEA-Kongreso.



Sekve la kompleta ekspozicio estis bonkvalite fotita kaj nun ĝi senpage exploreblas en nia muzea [fotogalerio](#) (unu el 55 pliaj albumoj tie),

Pere de lupeo +/- vi povas unuopajn panelojn proksimigi kaj ĝui la detalojn. Elkoran dankon al la kreintoj!

Dezirindas, ke ekestu pli da tiaj ekspozicioj, montrantaj personajn internaciajn kontaktojn pere de Esperanto.



-padv-, foto - zdhe-

J. Kořínek kaj V. Novobilský Elstaraj esperantistoj – sed alimaniere

Kono de Esperanto ĉe ambaŭ samideanoj estis senriproĉe perfekta, ambaŭ amegis la ĉeĥajn kulturon kaj historion kaj la baza eco de ambaŭ estis laboremo kaj humaneco. Tamen mi uzis la esprimon *alimaniere*. La kialo estas, ke ambaŭ aplikis siajn perfektajn konojn de Esperanto vere alimaniere:

Jiří Kořínek, verkisto kaj tradukinto en Esperanton okupiĝis plejparte pri poezio, beletro kaj muziko. Vlastimil Novobilský, male, okupiĝis en Esperanto plejparte pri literaturo de faktoj: historio, interlingvistiko, vivo kaj verkoj de Komenio, fakaj aplikoj de Esperanto.

Necesas ankoraŭ klarigi, kial mi enmetis ambaŭ diferencajn agantojn en unu artikolon. Ilin kunligas Věra Novobilská, fraŭline Kořínková, do filino de la unua kaj edzino de la dua. Profesie ŝi estis pedagogino (matematiko kaj fiziko) kaj dum aktivaj vivojaroj ŝi instruis en mezlernejoj kaj en la katedro de fiziko ĉe la pedagogia fakultato en Ústí nad Labem. Ankaŭ ŝin necesas mencii, ne nur pro ŝia perfekta scipovo de Esperanto, sed ŝi ankaŭ estis ofta kunlaborantino de sia edzo.



Jiří Kořínek (1906–1988) estis profesie komerca komizo de tekstila grandkomercejo en Brno. Tio estis interrompita nur dum la 2a mondmilito, kiam li estis devige laborigita en fandejo. En la jaro 1964 li transloĝiĝis kun sia edzino Hilda (lia unua persona Esperanto-lernantino, kiu kun li partoprenis ĉiujn Esperanto-aranĝojn) al Ústí, kie li ĝis sia pensiiĝo laboris kiel kontrolisto de kvalito en la entrepreno *Textil Liberec*.

Laŭ la Régulo-festlibro Kořínek estas aŭtoro de pli ol 500 originalaj poemoj. Li estas gajninto de 18 internaciaj literaturaj konkursoj. Krom poemoj li verkis ankaŭ lernigajn tekstojn. Mi nomu almenaŭ *Doktoro Zamenhof*, *Problemo de tradukado*, *Romanco f-majora de Beethoven* kaj *Taskoj de Nia Literaturo Beletra kaj Faka*. Ĉeĥa Esperanto-Asocio eldonis elekton de lia poezio kun la titolo *Vitrejoj*.

Same kiel aŭtoro Kořínek famiĝis kiel tradukinto. El pli ol 550 tradukitaj poemoj necesas nomi la poemaron *Sileziaj kantoj* de P. Bezruč (kune kun T. Pumpr kaj R. Hromada), *Manon Lescaut* de V. Nezval, *Nia sinjorino Božena Němcová* de F. Halas, *Panjo* de J. Seifert, *Flugilhava ŝtono* de Ladislav Podmele kaj la kristanan himnaron *Kantu al la Eternulo*. Por *Slovaka Antologio* li tradukis 19 poemojn de slovakaj poetoj.

Ĉar Kořínek estis tre muzikema, li ankaŭ tradukis multajn tekstojn al muzikverkoj, eĉ de la opero *Jakobeno* kaj *Bibliaj* kaj *Ciganaj kantoj*, ambaŭ de A. Dvořák, pluraj de L. von Beethoven, sed ankaŭ de multaj popolkantoj.

Vlastimil Novobilský (1935–2021 pro kovimo) finstudis kemion ĉe matematik-fizika fakultato de la Karola Universitato en Prago, en la jaro 1966 defendis la titolon Kandidato de Sciencoj ĉe *Kemiteknologia altlernejo* kaj en 1967 agis kiel unujara stipendiulo ĉe *Universitato de Heidelberg*.

Ĝis 1968 li laboris en *Esplorinstituto de neorganika kemio* en Ústí nad Labem kaj en 1968 li fariĝis universitata instruisto en *Pedagogia fakultato*. En la jaroj 1990–91 post intensa insistado de studentoj li fariĝis dekanato de la pedagogia fakultato kaj en la jaroj 1995–2001 li plenumis funkcion de la rektoro de la *Universitato J. E. Purkyně* en Ústí.

Pedagogie Novobilský agis en la fakoj ĝenerala kaj fizika kemio kaj kemi-didaktiko, science en la fakoj fosfor-kemio kaj kemio de vivomedio. Li postlasis abundan publikaron; temas pri 37 kemiaj publikaĵoj en la ĉeĥa, 14 eksterlande, 12 didaktikaj kaj 22 esplor-laboraĵoj, krome li gvidis 22 studentajn sciencajn kaj 13 diplomajn laboraĵojn.

Ankaŭ en la Esperanto-movado li agis fake. Li kunorganizis alterne en Slovakio kaj Ĉeĥio la seminariojn *Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko* (antaŭuloj de KAEST¹) kune kun Zdeněk Pluhař, Milan Zvara, Juraj Gondžúr kaj aliaj. Unika fariĝis la dua, en 1980 en Ústí, kiu li merite estis du-lingva kaj ĝin partoprenis ankaŭ ne-esperantistaj fakuloj, ĉefe kemiistoj. Tiam Novobilský havis enkondukan prelegon *Eduko kaj zorgo pri la vivo-medio*.

Li estis dumviva membro de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio ekde ĝia fondiĝo en 1969. En ĝi li agis kiel prezidanto de ties

Pedagogia sekcio, membro de eldona komisiono, poste prezidanto de scienc-teknika sekcio, komitatano kaj dum unu elektoperiodo estrarano. En 1996 li estis nomumita honora membro de ĈEA.

Ene de UEA Novobilský plenumis dum 40 jaroj la funkcion de fakdelegito pri kemio kaj en 1996 li estis rektoro de la Internacia Kongresa Universitato (IKU).

Ene de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) li estis ekde 1984 asociita profesoro, membro de Internacia Scienca Kolegio en San Marino kaj fakarvicestro de fakaro natursciencoj. Li ankaŭ estis fonda prezidanto de la ĉeĥa filio de AIS – ĝis 1994.

Sed li agis ankaŭ loke en diversaj funkcioj inkluzive de la prezidanto de la loka Esperanto-Klubo. Famaj fariĝis la pintkvalitaj Internaciaj Kulturaj Festivaloj en Ústí, kies ĉeforganizantoj estis geedzoj Novobilský, Jiří Kořínek kaj Miroslav Smyčka.

Novobilský postlasis ankaŭ abundan verkaron en Esperanto, de kiu necesas nomi almenaŭ iujn. Pro profunda intrerestiĝo pri Komenio multaj verkoj tuŝas lin, ekzemple *Interlingvistikaj konceptoj de J. A. Komenský*; *Nekonataj opinioj pri Komenský*; *Omaĝe al J. A. Komenský*. De la ceteraj mi nomu lian prelegon por IKU *Jaroslav Heyrovský: Nobelpremiito por kemio kaj fondinto de polarografio*; plue *Skizo pri la Esperanta literaturo*; *Kontribuo de ĉeĥaj verkistoj al la Esperanta literaturo*; *Listo de Esperantlingvaj publikaĵoj enlandaj kaj eksterlandaj*; *Comenius proposals* (en la angla), ampleksa *Intervjuo kun Ota Ginz pri liaj vivo, esperantiĝo kaj tutviva poresperanta laboro ĝenerale* (teksto kaj sonregistroj); kaj multaj aliaj.

¹ Pri la serio AEST, SAEST, KAEST mi skribos en iu el la sekvaj numeroj.

*



Se mi mencias la registraĵojn, necesas envicigi ankaŭ intervjuon kun Jiří Kořínek kaj lian dupartan prelegon pri Komenio. Ĉiuj ĉi estas troveblaj kaj aŭskulteblaj ĉe

<https://esperantobrna.cz>

Fine de priskribo de la publicaro mi menciuj ankaŭ iujn verkojn en la ĉeĥa rilatantaj al Esperanto. Kelkaj verkoj pritraktas ankaŭ en la ĉeĥa Komenion kiel antaŭulon de interlingvistiko, do ankaŭ de Esperanto. El pluraj mi menciuj almenaŭ *Česká literatura v esperantu, Esperantská díla českých autorů* kaj *Informatika a problém mezinárodního jazyka v období vědecké revoluce*. Precipe menciindas du libroformaj biografiaĵoj. La unua, *Jaroslav Novobilský: muž, který povýšil morální principy nad strach ze smrti* priskribas vivon de lia patro, instruisto, esperantisto kaj kontraŭnazia batalanto murdita en 1942 en Mauthausen kaj *František Vladimír Lorenc: svědectví o životě a díle neobyčejného člověka*.

Kiel la lastan verkon mi rememoros la komunan laboraĵon kun la edzino Věra, nome esperantigon de la libro de Chava Pressburger (fraŭline Eva Ginzová) *Deník mého bratra* (Taglibro de mia frato) Temas pri la aŭtentika taglibro de

la multflanke dotita juda knabo Petr Ginz, kiu ĝin verkis antaŭ ol li estis deportita al Terezín kaj sekve murdita en gazkamero. Lia fratino ĝin kompletigis per klarigoj kaj redaktoris.



Geedzoj Novobilský prezentas sian tradukon de *Taglibro de mia frato* en Brno en la jaro 2013



Internacia kultura festivalo en Ústí: B. Šrůtová (nun Převrátilová), V. Novobilský, M. Smyčka, J. Duda.

Petr Chrdle,
chrdle@kava-pech.cz

Ian Fantom kaj Gbeglo Koffi

Kien universala Esperanto-Asocio?

Enketo kaj historia evoluo. (Remit Press, Britio, 2025, 98 paĝoj)

Ian Fantom (*1945) estas angla pianisto kaj esperantisto laboranta pri informado, Gbeglo Koffi (1957) estas togolanda instruisto pri matematiko kaj esperantisto, gvidanto de privata lernejo Instituto Zamenhof kaj iama estrarano de UEA kaj iama akademiano. Ambaŭ estas tre zorgoplenaj, ke daŭre falas la membrobazo de UEA kaj klopodas trovi la kialon kaj kuracilon.

UEA estas gvidata de 9-membra Estraro elektita el 60-membra Komitato. Sian komitatanon rajtas havi landaj asocioj kun pli ol 100 membroj; se estas malpli, oni povas nomumi nur observanton sen rajto voĉdoni. UEA havas Centran Oficejon, kiun estras Ĝenerala Direktoro de UEA. En lastaj jaroj ankaŭ 6-membran Kongresan Fakon, kiu ĉiujare organizas Universalan Kongreson.

La aŭtoroj sendis al ĉiuj komitatanoj demandilon kun demando, kiun landon ili reprezentas, al kiuj grupoj ili raportis pri la komitataj kunvenoj, de kiuj grupoj ili petis opinion, kiujn pliajn funkciojn ili alprenis, de kiu laŭ ili estas UEA vere gvidata (de Estraro, Komitato, Ĝenerala Direktoro?), kiajn ŝanĝojn ili rimarkis dum sia elektoperiodo kaj kiuj estas dezirindaj? Al kio ili atribuas malkreskon de membrobazo?

La libro devigas ĉiun, al kiu ne estas la estonteco de nia movado indiferenta, vere enpenŝiĝi. Oni povas vidi la falon

de membrobazo ankaŭ nialande. En 1969 la nove fondita ĈEA havis pli ol tri mil membrojn, en 1990 nur 2,5 mil, nun ĉirkaŭ 500 homojn. Gbeglo Koffi mem jam tridek jarojn gvidas la lernejon Instituto Zamenhof, kie la infanoj povas lerni ankaŭ Esperanton, tamen li estas nur Observanto de Komitato, ĉar Togolando havas malmulte da esperantistoj.

La aŭtoroj metas al si demandon, ĉu UEA ne estas mallerte gvidata? Ĉu la homojn ankoraŭ altiras la interna ideo de Esperanto? Ĉu nuntempan movadon necesas motivigi alimaniere? Ĉu ni havas strategion aŭ nia strategio estas nur diskuti pri strategio?

Mi opinias, ke unue necesas difini, kian celon nia movado kaj niaj organizoj havas? Ĉu esti lingvolernejoj, libroeldonejoj, vojaĝ-agentoj, lingvistikaj institutoj? Ĉu celo estas enkonduki Esperanton en lernejojn? Ĉu prilabori lernolibrojn kaj terminarojn de ĉiuj fakoj por prepari la lingvon por ĝia tasko de internacia komunikilo? Ĉu nur zorgi pri funkciado de niaj organizoj, kolekti kotizojn, eldoni informilon, aranĝi kongresojn, karavanojn kaj ekskursojn? Ĉu membreco estas alloga por la nuntempaj homoj, precipe la junaj? Ĉu por ili pli gravas la interreto kun libera komunikado ol asociado?

La aŭtoroj ricevis nur kelkajn respondojn, tre malsamajn. Mi vidas valoron de la lingvo ne en tiuj respondoj, sed en la demandoj pri la estonteco de Esperanto.

Miroslav Malovec

El la esperantista mondo


■ **Literatura konkurso “ĤRISTO GOROV-HRIMA” – 2026** je la temo MIA PLEJ BELA ESPERANTO-REMEMORO. Ĝis la 30-a de septembro 2026 al Georgi Mihalkov, prezidanto de la ĵurio: modest.mihalkov@gmail.com (Nur unu eseo originale verkita, maks. 3 paĝoj A4, literoj Times New Roman, 12 punktoj, nomo, sekso, telefono, poŝt-adreso kaj retadreso.)

■ **Mi ŝatus korespondi** kaj amikiĝi kun viroj kaj virinoj en aĝo de 56-68 jaroj: Tapani Lappalainen Hauralantie 48, domo 7A, ĉambro 5, 37500 Lempäälä, Finnlando. Mia aĝo 68 jaroj (muziko, filatelo, ĉiaspecaj kolektaĵoj).

■ **Esperanto-arkivo inundita.** Sabate (24.1.2026) pro frosto krevis akvotubo super la plafono de la arkivo en Nová Dubnica, feliĉe damaĝis nur kelkajn vortarojn kaj dokumentojn.



■ **Nova numero de Unesko-kuriero** estas dediĉita al manĝado. Senpage elŝutebla ĉe <https://uea.org/revuoj>



La estonteco sur niaj teleroj; Ĉilio, pioniro en la etikadado de manĝaĵoj; Nutraĵoj kaj nemateria heredaĵo; En Kanado reviviĝas indiĝena kuirarto; Konsideri bes-

tojn kiel varojn ŝajnas al mi tute malĝuste; Uzi artefaritan intelekton por spuri malŝparon de manĝaĵoj; Dakaro, paradizo por amantoj de stratmanĝoj; La riĉa heredaĵo de mezepoka araba kuirarto; Ĉu vi parolas bestolingvon?

■ **Vinilkosmo ĉesas eldoni Esperanto-muzikon** pro nesufiĉa profitigo. Tamen la esperantista teamo [kreis novan retejon](#).



Malgraŭ ĉio ĉe www.vinilkosmo.com eblas aŭskulti esperantlingvajn kantojn.

■ **Nova eldono de Umberto Eco ĉeĥe.** La libro *Hledání dokonalého jazyka v evropské kultuře* (La serĉado de la perfekta lingvo en la Eŭropa kulturo), kiu favore informas pri la ideo de artefarita helplingvo, aperis ĉeĥe antaŭ 25 jaroj kaj nun estis eldonita nova eldono ĉe eldonejo Argo, ĉifoje sen kontraŭ-esperanta postparolo. La libro parolas pri Dante, Komenio, Descartes, Leibniz, Zamenhof, artefarita intelekto, filozofiaj lingvoj ktp.

■ **Anna Edés**, romano de Deszö Koszto-lyány (1885-1936) en traduko de Jozefo Horváth estas elŝutebla senpage ĉe:

<https://libro.ee/book.php?id=4180>

La hungara klasikulo rakontas pri knabino, kiu post la unua mondmilito venis serĉi laboron en Budapeŝto.

■ **Ĉeĥa gazeto Referendum** pri Vikipedio kaj Esperanto. Antaŭ 25 jaroj estis fondita angla Vikipedio, baldaŭ poste la Esperanta kaj ankaŭ la ĉeĥa. Gazeto Referendum petis M. Malovec priskribi, kiel li fondis ĉeĥan Vikipedion per traduko el Esperanto, kaj ĉar li menciis, ke ĉion detale priskribis Marek Blahuš, oni petis ankaŭ lin pri artikolo. Ambaŭ artikoloj legeblas ĉe la retejo de la gazeto: [Malovec](#) – [Blahuš](#).

■ **La slovaka Rádio Slovensko** lunde la 8-an de decembro 2025 je la 19.05 h elsendis programon „La mondo de muziko“, ĉiun kanton en alia lingvo, inter ili ankaŭ la kanton de Pavol Habera el la grupo TEAM [Reklamo al silento](#) en traduko de Stano Marček.

■ **La ĉeĥa Radio Dvojka** elsendis la 15-an de decembro 2025 programon pri L.L.Zamenhof „[La vorto pli fortas ol armilo](#)“. Oni menciis ankaŭ pri Karel Höger kaj Max Kašparů kiel pri esperantistoj. La [video](#) estas en Jutubo.

■ **LA 112-A UK 2027** okazos en Melburno/Narrm, Aŭstralio, de la 1-a ĝis la 8-a de julio 2027. Melburno, ĉefurbo de la subŝtato Viktorio, estas moderna kaj kultura centro de Aŭstralio, konata pro sia riĉa kultura vivo, vigla multnacia medio kaj mondfamaj edukaj institucioj, inkluzive de la Universitato de Melburno. La regiono estas la tradicia tero de la Kulina nacio. Melburno havas modernan kongresejon, efikan transport-reton kaj vastan loĝejaron.

■ En 2026 la **Kongreso de ILEI okazos ĉe Zaozhuang-a Universitato**, en urbo Zaozhuang de Shandong-Provinco de Ĉinio, de la 10-a ĝis la 16-a de julio. La evento okazos kunlabore kun la Universitato mem, kiu estas sidejo de la plej granda Esperanto-Muzeo de Azio kaj de la sola Esperanto-fako nuntempe aktiva oficiale agnoskata de la Ĉina Registaro. La temo de la Kongreso estas "Eduki profesiajn esperantistojn kaj protekti Esperanto-kulturon", dum la Simpozio esploros pli science la temon "Plialtigi lingvan konscion", tre gravan en tempoj de A.I.

■ **Riga gastigos la sesdekajn Baltiajn Tagojn**. Latvia Esperanto-Asocio invitas Vin esti partoprenantoj de la 60-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj ([BET-60](#)) – la plej popularan Esperanto-aranĝon en Baltiaj landoj, okazontan de la **4a ĝis la 11a de julio 2026** en Rigo – la ĉefurbo de Latvio. Kadre de la Tutmonda Ekzamentago 2026 de UEA la 11an de julio dum BET okazos **skriba KER-ekzameno**.

■ **Afrika bulteno preta**. Bonvolu malkovri la voĉojn de Afriko per la 53a nova numero de la periodaĵo [Esperanto en Afriko](#). Elŝutu ĝin senpage.

■ **La 43-a Ĝenerala Konferenco de Unesko** en la uzbekia Samarkando invitis ankaŭ reprezentantojn de UEA kaj ILEI.

■ **Kongreso en Israelo**. La [26-a kongreso](#) okazos inter la 9-a kaj 12-a de aprilo 2026 en la dezerta urbeto Micpe Ramon, la ĉeftemo “Tero kaj Kosmo”. Ekskursoj al kratero Ramon kaj stel-observejo.

■ **Festado en Nepalo**. Okazis la 166-a Zamenhofa Tago en Katmanduo kun la partopreno de 37 membroj.

Se nur 365...

Novjara mesaĝo de la Prezidanto de UEA

Kiam ni fermas unu jaron kaj malfermas la sekvan, natura demando aperas: kion ni faros? En UEA tiu demando prezentiĝas tiel: kion ni faros kune – por ke Esperanto plu prosperu kaj havu daŭripovan estontecon?

Mi eniras mian unuan jaron kiel Prezidanto de UEA kaj tiu demando resonas al mi kun speciala forto – la forto de espero. La respondo, mi konstatas, ne estas komplika. Ĝi kuŝas en simpla, sed potenca nombro: 365.

La jaro donas al ni 365 tagojn. Ĉu ili sufiĉas por ĉio, kion ni deziras fari? Pri tio ni devas pensi saĝe, ĉar revoj realiĝintaj ofte estas tiuj pli saĝe revitaj. Rilate UEA, necesas kompreni, kiom ampleksa estas nia agado kaj kio fundamentas ĝin.

UEA havas dekojn da fondaĵoj, kiuj subtenas agadojn komunuman, kulturen, edukon, sciencan kaj solidarecan. Sed malantaŭ ili kuŝas la administra bazo, sur kiu staras kaj la fondaĵoj kaj la servoj al nia komunumo, kelkaj ligitaj al la aliĝkotizoj, aliaj plene senpage disponeblaj, kiel la retejo Eventa Servo.

Tiu administra – fundamenta – bazo funkcias danke al la ĝenerala kaso de UEA. Kaj por subteni tiun kason antaŭ kelkaj jaroj ekfunkciis la donacprogramo Alianco 365, kiu invitas esperantistojn simbole donaci po nur 1€ tage, do 365€ jare. Se nur 365 esperantistoj alianciĝus, tio mirinde proksimigus la realigon de tio, kion ni ĉiuj komune deziras.

Alianco 365: simpla ideo, kiu subtenas tutmondan revon.

Se aliancano donacus al UEA unu eŭron (25 Kč) tage, do 365 eŭrojn jare (9125 Kč), kaj se troviĝus 365 aliancanoj, UEA ricevus ĉiujare 133 225 eŭrojn (3,3 milionoj da kronoj) kaj solvus siajn financajn problemojn.

(Rim. de la redaktoro)

La programo naskiĝis el simpla ideo: multo fariĝas ebla, kiam homoj kontribuas simbole, sed konstante. Fariĝi aliancano estas eniri en tutmondan rondon de subtenantoj, kiuj kontribuas po nur 1€ tage, tio estas 31€ monate aŭ 365€ jare. Por unu homo tio eble ne estas granda sumo, sed por la tuta grupo tio montriĝas kiel potenca kolektiva forto.

UEA estas neprofitocela organizaĵo. Ĉio, kion ĝi faras – ĉiu servo, retejo, eldonaĵo, rilato kun eksteraj institucioj – dependas de nia komuna subteno. Aliĝo estas esenca, ĉar antaŭ ĉio tio estas subteno al la statutaj celoj de UEA, sed nur tio hodiaŭ ne sufiĉas: kvankam la membraro kreskas averaĝe je 3% ĉiujare ekde 2019, la enspezoj pro kotizoj ne samproporcie kreskas, ĉar pli granda parto de la membroj nuntempe venas el regionoj kun pli malaltaj kotizoj.

Tio mem ne estas malbona, sed tamen enspezoj pro kotizoj reduktiĝas. Kaj tial Alianco 365 fariĝas strategia respondo por garantii la financan daŭripovon de la asocia agado. Mobilizi donacantojn estas unu el la ĉefaj paŝoj al tio.

Kadre de la nova strategia plano: AKIRI 2025–2030

En 2025 UEA lanĉis novan strategian planon, AKIRI, kiu gvidas la Asocion laŭ kvin agadkampoj: Administrado, Kunlaborado, Informado, Rilatoj kaj Instruado. Inter la celoj de Administrado troviĝas financa daŭripovo – garantii la necesajn enspeznivelejn per diversigo de la financaj fontoj.

Alianco 365 estas konkreta maniero efektiviĝi tion. Ekde 2019 ĝi jam montriĝis grava por la kresko de donacoj al la ĝenerala kaso. Hodiaŭ la kosto por funkciigo de la administra bazo estas averaĝe ĉ. 320 000€ jare, dum la enspezoj pro aliĝkotoj estas averaĝe ĉ. 120 000€ jare. Rentoj kaj subvencioj en la lastaj jaroj kovris la diferencon, sed neniu povas garantii, ke ili estos same disponeblaj estonte.

Tial necesas plifortigi la donacvarbadon. Kaj se nur 365 alianciĝus – malpli ol 10% de la nunaj individuaj membroj – tio sufiĉus por venigi 133 225€ jare, pli ol trionon de la bezonata administra buĝeto.

Financa daŭripovo ne estas nur teknika afero. Ĝi donas sekurecon, stabilecon, planeblon kaj kapablon investi (ne nur monrimedojn, sed ankaŭ tempon) por tio, kio gravas: informado, instruado, pli fortaj rilatoj, novaj teknologioj kaj pli kaj pli kvalite servi esperantistojn tutmonde.

Subteni ne nur agojn, sed valorigi vivojn.

Oni ofte imagas, ke donacoj al la ĝenerala kaso subtenas nur rutinan administradon. Sed la vero estas alia: ili subtenas homojn – dediĉitajn, kompetentajn, sen kiuj UEA simple ne povus ekzisti.

Hodiaŭ UEA funkcias per internacia,

tutmonda kaj diverseca teamo. Ankaŭ tio estas parto de la strategia celo Administrado – kunordiga efikeco: per kiu ni deziras labori kun homoj el diversaj regionoj, tempozonoj, aĝoj kaj kulturaj fonoj, por ke UEA mem spegulu la tutmondecon de Esperanto.

Viaj donacoj do subtenas la laborojn de kolegoj kaj amikoj interalie el Nederlando, Rumanio, Meksiko, Germanio, Rusio, Togolando, Kolombio/Kanado, Brazilo, Hungario kaj Filipinoj/Hispanio – kaj ankoraŭ aliaj! Temas pri homoj, kiuj nun dediĉas sian vivon al Esperanto. Ili meritas nian subtenon kaj nian plenan respekton per la valorigo de ilia agado. La donacoj al la ĝenerala kaso estas unu el la manieroj fari tion, ĉar kontribuantoj al la sekureco kaj stabileco de ilia deĵorado. Tiusence via donaco estas investo en homoj kaj servoj – en amplekse signifohava daŭripovo.

Se nur 365... la potenco de unuiĝo

Ni foje pensas, ke nur unuopaj, grandaj monsumoj povas solvi niajn defiojn. Sed la historio de Esperanto montras, ke nia movado ofte progresis danke al la unuiĝo de multaj, kies kontribuoj kolektive fariĝis decidaj.

Imagu do tion: se nur 365 homoj – en mondo de miliardoj – donacus po 1€ tage, UEA povus: certigi stabilan administran strukturon, subteni movadajn projektojn, plifortigi sian ĉeeston en internaciaj institucioj, modernigi retejojn kaj komunikajn kanalojn, ampleksigi siajn servojn al la komunumo tutmonde.

Novjara invito: fariĝu unu el la 365

Noto: kontribui por Alianco 365 eblas per unufoja pago rekte en la aliĝilo – <https://uea.org/alighoj/alighilo> – aŭ por monata kontribuo vizitu:

https://revuoesperanto.org/alianco_365.


La kluba vivo

Prostějov: Kunvenoj en 2026: 8.1. – 5.2. (jarkunveno) – 5.3. – 2.4. – 7.5. – 25.6. – 3.9. – 1.10. – 5.11. – 3.12.
Silvestro 2025 en la klubo:

let.lancov@seznam.cz
+420 604 940 663



Brno: O. A. Fischer enĉeĥigis libron de Ēva Tófalvy, edzino de Oldřich Kníchal,



kiu forpasis pli frue ol li sukcesis fari la tradukon mem. La verko *Vysvobození* (La Liberigo) priskribas la vivon de du junaj geamantoj, esperantistoj, hungarino kaj ĉeĥo, en la tempo de la

Husáka normaligo. La libro estas havebla en [retbutiko](#) de Esperantista klubo Brno. Prezo 150 Kč + sendokostoj. Kiel mendi vidu supre ĉe retbutiko aŭ skribu al butiko@esperantobrno.cz.

Šumperk: La klubo en januaro festis vivjubileon de la populara klubano Kvido Janík, fama pro originala humuro.

Jarkunvenon 5.2.2026 ĉeestis 9 membroj kaj unu gasto. Estis elektita kluba komitato: Jaroslav Liška (prezidanto kaj kasisto), Pavel Smělý (bibliotekisto), Martin Pokorný (konto-kontrolanto).

Třebíč: Kursoj en Lančov

- 19.7. – 1.8.2026 7690 Kč
- 2.8. – 14.8.2026 7490 Kč
- Renkonto de eksaj tendaranoj:
14.8. – 16.8.2026



Ni invitas vin al posteulo de popularaj aranĝoj de [AEH](#) en Skokovy, ĉi-foje al

LINGVA SEMINARIO

15.-18.4.2026 en Pacov

Atendas vin

antaŭtagmezaj lingvoseminarioj
posttagmezaj ekskursoj
vespera amuziĝo



Okazloko: [Turisma hotelo Vysočina de la Klubo de ĉeĥaj turistoj](#), Pošenská 1061

Kapacito 9 dultaj ĉambroj kun lavujo en la ĉambro kaj komunaj duŝejoj/necesejoj

Partoprenkotizo: 1.490,- CZK inkluzivas 3 tranoktojn kun matenmanĝo, instruon kaj vesperan programon kaj organizajn elspezojn (pagota surloke). Kostojn por ceteraj manĝoj kaj ekskursoj ĉiu kovros individue.

La aranĝo komenciĝas merkrede post tagmanĝo kaj finiĝas sabate post tagmanĝo.

Trafika alirebleco: per buso kaj trajno el Tábor kaj Pelhřimov (vidu [IDOS.CZ](#)), de la stacidomo eblas peraŭta alveturigo.

Pliaj informoj kaj aliĝiloj:

Kompletigitan [formularon](#) sendu retmesaĝe al Milada Zemanová zemamka@seznam.cz
tel. +420 606 617 319

IFEF en Choceň:

<p>Čeĥa fervojista esperanto asocio invitas vin al</p> <h3>Lingva ekzercado</h3> <p>dediĉita al lingvo Esperanto, kju okazos en nia kŭbejo en stacidomo Choceň 6.3-7.3.2026</p> <p>Por la partopreno estas bezonata aliĝi. Nombro de partoprenantoj estas limigita por dek personoj.</p> <p>Kontakto: cefea@centrum.cz Telefona: 607 973 472</p>	<p>Čeĥský železničářský esperantský svaz si vás dovoluje pozvat na</p> <h3>Jazykové procvičování</h3> <p>věnované jazyku esperanto, které se bude konat v naší klubovně na nádraží v Choceňi 6.3-7.3.2026</p> <p>Na tuto akci je třeba se přihlásit, počet účastníků je omezen na deset.</p> <p>Kontakt: cefea@centrum.cz Telefon: 607 973 472</p>
--	--

Ne necesas esti IFEF-ano, ne necesas partopreni dum la tuta tempo. La lingva ekzercado estas senpaga, partoprenantoj pagas nur por manĝo kaj tranoktado.

Aliĝu ĝis la 25-an de februaro 2025.
cefea@centrum.cz Tel.: 607 973 472

Vendrede

14.30 – 15.30 unua leciono
15.30 – 16.30 dua leciono
16.30 – 17.30 tria leciono
17.30 – 19.00 vespermanĝo
19.00 – 20.00 prelego
20.00 – 21.00 babilado

Sabate

9.00 – 10.30 ekskurso en Choceň
10.30 – 11.30 kvara leciono
11.30 – 12.30 kvina leciono
12.30 – 14.00 tagmanĝo kaj babilado

<p>Programo: 6.3.2026 14:30-15:30 unua leciono 15:30-16:30 dua leciono 16:30-17:30 tria leciono 17:30-19:00 vespermanĝo 19:00-20:00 prelego 20:00-21:00 babilado</p> <p>Programo: 7.3.2026 9:00-10:30 ekskurso en Choceň 10:30-11:30 kvara leciono 11:30-12:30 kvina leciono 12:30-14:00 tagmanĝo kaj babilado</p> <p><u>Poste forveturo hejmen.</u></p>	<p><u>La limdato por aliĝado:</u> 25.2.2026</p> <p>La aranĝo estas taŭga por ĉiuj niveloj.</p> <p>Vi ne devas esti membroj de la nia asocio.</p> <p>Vi ne devas partopreni dum la tuta aranĝo.</p> <p>Vi ne devas tranokti en Choceň</p> <p>La lingva ekzercado estas senpaga.</p> <p>Partoprenantoj pagas nur manĝojn kaj tranoktadon.</p>	<p>Programo: 6.3.2026 14:30-15:30 unua lekcio 15:30-16:30 dua lekcio 16:30-17:30 tria lekcio 17:30-19:00 vespero 19:00-20:00 prelego 20:00-21:00 babilado</p> <p>Programo: 7.3.2026 9:00-10:30 ekskurso en Choceň 10:30-11:30 kvara lekcio 11:30-12:30 kvina lekcio 12:30-14:00 tagmanĝo kaj babilado</p> <p><u>Poste forveturo domon.</u></p>	<p><u>Ŝtaste se nepozdění do 25.2.2026</u></p> <p>Akcio je vhodná pro všechny úrovně znalosti.</p> <p>Nemusíte být členy našeho spolku.</p> <p>Nemusíte se zúčastnit po celou dobu.</p> <p>Nemusíte nocovat v Choceňi.</p> <p>Jazykové procvičování je bezplatné.</p> <p>Účastníci si hradí jen jídlo a nocleh.</p>
--	---	--	---

La 111-a Universala Kongreso

1.-8.8.2026 en Graz (Aŭstrio)

Post la sukcesa kongreso en Brno, la 111-a UK okazos escepte tuj en nia najbara lando, en [Graz](#), la ĉefurbo de [Stirio](#).



Denove atendas vin elstare riĉa programo prelega, diskuta, ekskursaj kaj kultura kaj unika ebleco renkonti nevirtuale viajn geamikojn kaj trovi la novajn. Ĝis nun (en februaro) aliĝis 740 personoj el 56 landoj.

Okazloko: reprezenta [Kongresa Centro](#), Albrechtgasse 1, en la historia urbocentro. Ĉi-foje la tagaj, kaj la vesperaj programoj okazos komforte en la sama ejo.



Fonto: Wikimedia Commons, [Aindi oisn](#) CC 3.0

Kotizo por la programo kaj organizaj elspezoj **ĝis 31.3.** estas por ĉeĥoj 180 Eŭroj (por membroj de UEA) kaj 230 Eŭroj (por nemembroj), sekve ĝis 30.6.

215/resp. 270 Eŭroj. Kunuloj (samhejmuloj), junuloj kaj handikapuloj havas rabatitan prezon (90/resp. 130, post 31.3. 110/resp. 155).

Pli detale vidu la [Kotiztabelon](#). Tra-noktado, manĝoj kaj ekskursoj pageblas aparte.

Jam baldaŭ aperos **Dua bulteno** kun detala oferto por loĝado kaj ekskursoj.

Promesatas i.a. tre avantaĝa loĝado en studenthejmoj inkl. favorprezajn manĝojn. Sed vi povas kompreneble aranĝi ĉion memstare.

Ebleco pagi pere de ĈEA en ĉeĥaj kronoj finiĝis en decembro 2025. Tamen transpigi el via krona bankokarto (laŭ la aktuala kurzo) senkomplike eblas. Konkretaj informoj aperas post via pleniĝo de la [Reta aliĝilo](#).

Ĉiujn necesajn informojn (Reta aliĝilo, Kotiztabelo, Unua Bulteno, kaj sekve Dua Bulteno, Listo de aliĝintoj ktp.) vi trovos en la oficiala retejo

<https://uea.org/kongresoj>.

Sendube indas utiligi la okazon partopreni la unikan eventon tiom proksiman kaj bone atingeblan de Ĉeĥio! La sekva UK 2027 okazos en Melburno (Aŭstralio).

La urbo atingeblas bone per buso aŭ trajno aŭ individue per aŭto. Ni alportos retforme pliajn informojn kaj eblecon por ev. kuniĝi por grupa vojaĝo.

Pliajn informligilojn (pri la sociaj retejoj rilate UK, turismaj videofilmoj, informlibreto pri la urbo en Esperanto k.a.) vi trovos en la Kalendaro de nia asocia retejo en

<https://www.esperanto.cz/eo/akce/la-111-a-universala-kongreso-de-esperanto-1598.html>

Ni antaŭĝojas vian partoprenon!

-padv-

Por iom distri

Komparon de ĉeĥaj kaj esperantaj frazeologiaj esprimoj el la libro *La edzino de l' tempojoĝanto* preparis Mirka Tomečková. **Ne temas pri precizaj tradukoj**, sed kion ŝi vere trovis en la du libroj. (*daŭrigo de la pasinta numero*)

Chodit kolem horké kaše Rondiri ĉirkaŭ poto

Proleženiny Kuŝeskaro

Happy birthday Bondezirojn al vi

Těžit z nevědomosti fruktuzi nesciecon

Jsem po nich ospalý ili igas min somnoli

Rozsah hlasu gamo

Houpačka pendolo

Jak ho bůh stvořil nuda kiel vermo

Copánky feltharoj

Skinhead haŭtkapulo

Nadšeně se ke mně hnál feliĉa navigis en mia direkto

Koňská dávka amasa dozo

Družička honorfraŭlino

Přítmí febla lumo

Na mou duši na psí uši mian skoltan honorvorton

Něco mne vyřadilo ze hry io kurtcirkvitis la aparaton

Lékovka Pilolujo

Záchranář sukuristo

Chytat lelky pigrumi

Komínek časopisů rako da revuoj

Postříkat kolínskou dabi per postraza likvo

Útulný gemuta

Poryvy větru proti domu vento impetas kontraŭ la domon

Pobíhá kolem mne ŝi aferumas ĉirkaŭ mi

Zavěšení do sebe brakplekte

Navlékl mi prsten glitigis ringon laŭ mia fingro

Jednohubka sandviĉeto

Podvazek ĵartelo

Dobrou noc, ať tě blechy.... bonan nokton, bele sonĝu, litocimoj vin ne ronĝu

Jaké to je být vdaná? Kiel sentiĝas esti edzino?

Zaniká v hluku restaurace forfandas en zumoj de restoracio

Renta fidofonduso

Špagety langeto-nudeloj

Dálkové ovládání teleregilo

Aviváž postlava moligilo

Ježkova noho sankta di-eto

Genitálie pudendo

Střečkovat jako splašený kuň retropaŝi kiel kalcitra ĉevalo

Kabinka ĉelo

...zoofil má zálusk na ovce malvirtigi ŝafojn

Voda se valí po čelním skle ŝuŝado de akvo

Jedem ni forŝaŭmu

Máme ho v hrsti li estas hokita

Vyhrň rukáv kuspu manikon

Náplast pretpansaĵo

Proutěné křeslo vimena brakseĝo

Otočná židle pivotseĝo

Váleček rulknedilo

Mydlit vařečkou ne skoldu min

Zhroucení počítačů sistempaneo

Ohňostroj Artfajraĵoj

Císařský řez Cezara sekco

Vrkala Clare rukulis Clare

Nosil mne na koni mi rajdis sur liaj ŝultroj

Jdi se vycpat iru bugriĝi

Stočená do klubička buliĝas

Úniková cesta Fuĝrimedo

Navedla mne na to Instigis min fosi tiun ĉi sulkon

Myšák Mickey Miĉjo muso

Majáky blikaly lumoj blinkaj-fulmaj

Kořen nosu loboĵ

Krev bušila ve spáncích koro batis en oreloj

Dokážeme to vyvolat ni povas okazigi tion

Rulička od toal. papíru necesejpapera cilindro

Bloumal jsem dum mi farnientis

Kuchynská linka stablo

Stojí to za to eĉ se doloros, la penon valoros

Nechal jsem ji vydýchat rasli

Utřel jsem jí oči dabas

JUBILEANTOJ DE JANUARO, FEBRUARO KAJ MARTO 2026

Ing. Jitka Daňková, Brno
Ing. Viktor Dvořák Csc., Moravské
Budějovice
Ing. Petr Chrdle, Dobřichovice
Bohumír Chytka, Pyšel
Kvido Janík, Šumperk
Ing. Václav Kekule, Sázava
Pavel Kleissner, Libčice nad Vltavou
Petr Kráčmar, Hořice v Podkrkonoší
Ing. Jaroslav Krbec, Hromnice
Ladislav Láni, Olomouc
Ing. Antonín Lecian, Ostrava-Poruba
MUDr. Čestmír Ramík, Ostrava-Poruba
Marie Ribasová, Nový Bor
Karel Ryšánek, Praha
Jan Sviták, Poděbrady
Mgr. Miloš Šťastný, Třebíč
Miloslav Šváček, Penčice
Hana Vašková, Zákolany
Jarmila Valentová, Velké Losiny
Pavla Zemanová, Praha

Kaj poetino, amika al Esperanto
Ljubov Vondroušková

Al ĉiuj jubileantoj ni deziras ĝojon,
kontenton, sanon, ĉion plej bonan en la
estonta tempo.

Ni rememoras

[Karel Kraft](#) – 100 jaroj de naskiĝo
[Přemysl Pitter](#) – 50 jaroj post forpaso
[Ota Ginz](#) – 50 jaroj post forpaso
[Rudolf Krehňák](#) – 30 jaroj post forpaso
[Karel Janouš](#) – 110 jaroj de naskiĝo kaj
30 jaroj post forpaso
[Josef Vávrovský](#) – 80 jaroj post forpaso

Viktor Dvořák – 90

Viktor Dvořák organizis ekspoziciojn pri Komenio kaj internacia lingvo, pri Otakar Březina, pri Sankta Klemento Maria Hofbauer-Dvořák; li donacis al Nacia Biblioteko fondoŝtonon en la nomo de esperantistoj; plie li eldonis poemojn de O. Březina en traduko de T. Pumpr kaj J. Kořínek, kiujn li kompletigis per alilingvaj tradukoj (li trovis plej multajn kaj ricevis de Muzeo de Rekordoj en Pelhřimov diplomon). Lia lasta ago estis donaco de mil ekzempleroj de Březina al kongresanoj en UK Brno 2025.



Miloslav Šváček – 85

Dum socialismo li estis persekutata pro organizado de katolikaj tendaroj, post la jaro 1990 li fariĝis prezidanto de la ĉeĥa IKUE-sekcio, inter 2008-2012 eĉ de la tutmonda IKUE. Li organizis IKUE-kongresojn en Kroměříž kaj Velehrad, redaktas gazeton Dio Benu kaj ricevis de la urbo Přerov medalon J. A. Komenio pro propagando de la urbo.



Petr Chrdle – 80

Multjara ĈEA- kaj UEA-estrarano, organizanto de karavanoj al UK-oj, de KAEST-oj, preleganto, nia plej grava eldonisto de Esperanta literaturo, sed ankaŭ mem aŭtoro: *Esperantem za tři měsíce*, *Sen laco por paco*, *Ĉinio*, *Koreio*, *Japanio*, *Mia vivo kun Esperanto*, *Profesia uzo de Esperanto*, *La stato kaj estonteco de Esperanto*.



Kondolencoj



Karel Čada (1942 – 2026). Forpasis la 14-an de januaro 2026. Ankoraŭ en Starto 2/2024, p. 58, ni informis pri lia vivo en la pensiulhejmo en Ústí nad Orlicí.

Bohumíra Baierová (1927-2025). Forpasis 13.12. 2025 en benita aĝo 98 jaroj. Longjara aktiva membrino de EK Strakonice, post 1989 de EK Písek.

ROB MOERBEEK

(1936 – 2025)

Rob Moerbeek estis ekde 2011 honora membro de UEA. Ekde julio 1969 li laboris en la Centra Oficejo (CO). Li formale emeritiĝis post 32-jara laborado la 27-an de aprilo 2001, sed neniam ĉesis labori por la Asocio: post la emeritiĝo li fariĝis konstanta volontulo. Inter liaj plej konataj taskoj estis la provlegado kaj lingva reviziado de la eldonaĵoj de la Asocio, inkluzive de la revuoj Esperanto kaj Kontakto. Krome li prizorgis la ekspedofakon de la CO, la Arkivon de UEA kaj la Bibliotekon Hector Hodler (BHH). En 2018 Rob ricevis la nederlandan Reĝan Ordenon de Oranje-Nassau. Ni vidis lin lastfoje en nia UK 2025 Brno. († 27. 11.2025).



Eduard Borsboom

(1936-2025)

nederlanda lingvoinstruisto kaj esperantisto (ekde 1951), esploranto de la historio de Esperanto; aŭtoro de *Vivo de Lanti* (1976), *Vivo de Andreo Cseh*

(2003), *Kie miozotas memor'* (2017), kompilinto de *Vortoj de Andreo Cseh* (1984); kunlaboranto de *Literatura Foiro* kaj *La Gazeto*; honora prezidanto de Internacia Esperanto-Instituto, laŭreato de la premio de OSIEK (2004). († 2. 12.2025)

Émile MALANDA NIANGA

(1967-2025)

Malanga estis prezidanto de Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio (2003-2006) kaj membro de Afrika Komisiono de UEA. Post ellerno de Esperanto (1987) li laboris en TEJO, UEA, IKEF, ILEI. En la jaro 2009 li transloĝiĝis al Sud-Afriko kaj fondis sud-afrikan sekcion de ILEI. († 5. 1.2026)



Jacques LE PUIL

(1940 – 2026)

esperantista artisto el Francio, ĉefredaktoro de humura gazeto *La Kancerkliniko*, esperantlingva kanzonisto, gvidanto de la kabaredo *La ruza kruĉo* kaj ĉefredaktanto de la renoma vortaro *Grand Dictionnaire Français-Espéranto* (ĉi-lasto kun Jo-Petro Danvy). Kun sia kunulino Armela LeQuint, li plenumis gravajn tradukverkojn kiaj *Vojaĝo ĝis noktofino* (Celine), *Florville kaj Courval aŭ fataleco* (Markizo de Sade), *La maljunulino kiu paŝis en la maro* (San-Antonio), *Higieno de l' murdisto* (Amelio Notombo), *Paĉjo, kio estas rasismo?* (Taharo Benĝeluno), *La leciono* (Eugène Ionesco). († 5. 1.2026)



fotoj kaj informoj el Vikipedio

Kamila Bártlová-Lampířová (1931 – 2025)

En "Batalo de la Tri Imperiestroj" (1805) kelkajn kilometrojn okcidente de la urbo Slavkov (Austerlitz) apud Brno estis grave vundita simpla franca soldato Jean Pierre Lampire. Li estis flegita de juna loka knabino, post lia resaniĝo ili geedziĝis kaj baldaŭ havis filon.



Sinjorino Kamila, tiam nomata Lampířová laŭ sia patro, unue studis en gimnazio kaj poste en la filozofia fakultato de Universitato de Karolo en Prago. Post la rigora ekzameno ŝi fariĝis doktorino pri filozofio. Kiel juna virino, ŝi komencis studi eĉ Esperanton, kion ŝia patrino instigis ŝin fari. Post edziniĝo al maŝininĝeniero Zdeněk Bártl la juna paro loĝis en la malgranda urbo Okříšky apud Třebíč en la Sudmoravia regiono. En Okříšky, ŝi instruis la ĉeĥan lingvon en la loka bazlernejo.

Tie ŝi havis la ideon instrui siajn lernantojn, kiuj montris intereson, t.e. laŭvole, al la internacia lingvo Esperanto. Dum la jaroj de ŝia instruista kariero multaj lernantoj vicis en ŝia E-grupo. Por ke ŝia instruado estu pli efika, ŝi amikiĝis kun franca instruistino Maryvonne Houvriez, kiu ankaŭ instruis Esperanton al siaj francaj lernantoj en la urbo Chateauroux, 250 km sude de Parizo.

En la 1990-aj jaroj s-ino Kamila demandis sian francan koleginon en unu el siaj leteroj, ĉu ŝi povus helpi ŝin trovi eblajn posteulojn de la eksa franca soldato Jean Pierre Lampire. La serĉado estis malfacila, sed la rezulto tamen venis, en la persono de Frederic Lampire. Ĉi tiu viro, ĉirkaŭ 40-jara, tiutempe

posedis videoproduktejon en Parizo. Lia firmao sendube sukcesis, ĉar mi mem spektis unu el la francaj filmoj kiel parton de la geografia serio "La Belecoj de Eŭropaj Marbordoj" en la ĉeĥa televido.

D-ino Kamila kaj s-ro Frederic konsentis renkontiĝi en Prago. Frederiko, kiel profesiulo, ne venis sola, sed kun sia tuta laborteamo, kaj ĉiuj jam estis pretaj por tre interesa laboro. La rezulto de ilia plurtaga restado en Prago estas 50-minuta filmo pri la plej belaj historiaj kaj arkitekturaj monumentoj de Prago. La enhavon de la filmo akompanas faka komentario en la franca lingvo.

Mi ricevis kopiaĵon de la filmo kiel donacon de D-ino Bártlová-Lampířová.

Restas nur aldoni, ke ŝi laboris kelkajn jarojn, krom sia instruista praktiko, en la pedagogia sekcio de la ĈEA. Ŝi ankaŭ dediĉis sin al sia propra literatura verkado – ŝi verkis fabelojn, rakontojn kaj poemojn. Ŝi aparte taksis la Premion Andersen, kiun ŝi ricevis en 2000 en Finnlando pro la publikigo de la fabelo "La fabelputo de panjo".

D-ino Bártlová ankaŭ amplekse kontribuis al la regiona gazetaro "Horácké noviny" ĝis sia alta maljuneco. En siaj kontribuoj ŝi kutime raportis ne nur pri siaj propraj sukcesoj, sed ankaŭ pri la sukcesoj de sia lerneja Esperanto-grupo por atentigi pri la avantaĝoj de la internacia lingvo.

Dum la lastaj kelkaj jaroj de sia vivo ŝi loĝis en pensiulejo sub medicina prizorgo, ĉar ŝi estis grave malsana. Ŝi mortis fine de 2025, en la aĝo de iom pli ol 94 jaroj. La 5-an de februaro 2026, do estas konvene memori la neĝisvivitan 95-jariĝon.

-ijk-

Změna hlavního delegáta UEA



Děkujeme **Petru Chrdlemu**, čestnému členu ČES a UEA, který po dlouhá léta vykonával funkci hlavního delegáta (od Starta 4/2011) vedle své rozsáhlé nakladatelské činnosti.



Nyní se hlavním delegátem stal **Milan Kolka** z Brna, programátor na právnické fakultě Masarykovy univerzity v Brně a předseda brněnského esperantského klubu.

Milan Kolka dává záznamy klubových přednášek na klubový web, vede kurzy esperanta internetové a fyzické (v Moravské zemské knihovně). Zpracoval pro web tematický slovník Ilony Koutny, u které studoval interlingvistiku v Poznani.

Hlavní delegát vám může pomoci s členstvím v UEA a přihlášením na UK, zejména když nemůžete vyplnit on-line přihlášku nebo váháte, jaký typ členství zvolit. Dále hlavní delegát přibližuje informace o činnosti UEA členům Svazu. Kontakt: cefdelegito@esperanto.cz

Pokud jste člen ČES, můžete poplatek za členství v UEA a kongresový poplatek platit v korunách na účet Svazu. Číslo účtu a varibilní symboly jsou na straně 30, do poznámky uveďte, za co platíte (např. Karel Novotný, členství UEA pro 2026). Ideálně plaťte každou položku zvlášť. Pokud platíte více položek současně, napište, prosím, pokladní Svazu. Sumu, kterou budete platit na účet svazu, si spočtete tak, že částku v EUR vynásobíte aktuálním kurzem (ČSOB deviza prodej + 0,1 Kč) podle [kurzovního lístku](#). V případě nejasnosti kontaktujte pokladní ČES.

Zvýšení členských poplatků v 2026

Na volebním sjezdu v Havířově byla schválena nová výše členských příspěvků s platností od 1. 1. 2026, což znamená mírné navýšení, a to takto:

A: řádný člen, osoba ekonomicky aktivní

- s tištěným Startem – minimálně 400,- Kč/rok
- s přístupem k elektronickému Startu – minimálně 290,- Kč/rok

B: řádný člen, osoba ekonomicky neaktivní (studenti, důchodci, invalidní důchodci, rodič na rodičovské dovolené)

- s tištěným Startem – minimálně 300,- Kč/rok
- s přístupem k elektronickému Startu – minimálně 190,- Kč/rok

C: řádný člen (rodinní příslušníci člena v kategorii A, B nebo F; zájemci o členství bez Starta vč. elektronického; osoby nevidomé s předplatným elektronické formy Starta ve spec. úpravě v HTML formátu), minimálně 150,- Kč/rok

P: příznivci esperanta (bez závazku učit se esperanto a nároku na Starto), minimálně 200,- Kč/rok

F: doživotní, řádný člen (členové ČES, kteří v minulosti jednorázově výrazně podpořili činnost ČES; od roku 2004 se nelze stát novým doživotním členem), roční příspěvek je dobrovolný
Předplatné Starta (bez členství v ČES) 300,-Kč/rok Protože v jedné rodině obvykle stačí jeden exemplář časopisu Starto, platí si jeden člen rodiny členství v kategorii A, B nebo F, ostatní rodinní příslušníci kategorii C.

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**. Do Zprávy pro příjemce uveďte jméno a příjmení a účel platby (např. **Jan Novák, členství ČES**). Pokud platíte za klub nebo sekci, uveďte své jméno a pošlete seznam za koho platíte na emailovou adresu Andrey Švubové a.svubova@email.cz.

Můžete, ale nemusíte, jako variabilní symbol použít čísla níže uvedená, případně své členské číslo:

06940 členství ČES

06941 členství UEA

06942 předplatné Starta bez členství

06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky

06944 poplatek UK

06946 konference/sjezd ČES

50400 komise pedagogická ILEI

50401 písemný kurs začátečníci

50402 písemný kurs pokročilí

50800 sekce nevidomých LIBE

Své účty mají KELI a IKUE

51000 sekce křesť. esp. KELI,

č. ú. 123 - 830 734 0217/0100

Komerční banka Poděbrady

51100 sekce katol. esp. IKUE

vlastní b. ú. 1647837113/0800

Internacia Infana Kanto

Svitavy 20 junio 2026

La aranĝon povas partopreni infanoj, kiuj kantos unu kanton en la gepatra lingvo kaj unu en Esperanto. Por ke ni povu prepari diplomojn por la infanoj, bonvolu anonci anticipe.

dvor.libuse@seznam.cz.

Mezinárodní dětská píseň

Jedna píseň v rodném jazyce, jedna v esperantu. Děti dostanou diplomy.

Předplatné časopisů

Jak objednat

Do emailové objednávky uveďte jméno, příjmení, poštovní adresu nebo emailovou adresu, objednávaný titul. Svou objednávku zašlete Janě Zigal na email peranto@esperanto.cz

Pak zaplatíte částku pro daný časopis a typ předplatného na účet svazu **2800186228/2010** a do **Zprávy pro příjemce** uveďte: jméno, příjmení, časopis, rok. Příklad:

Jan Novák, předplatné Monato 2026

Monato: 1456,- Kč (pozemní poštou), 1506,- Kč (letecky), 879,- Kč (elektronicky), 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4

Juna Amiko: 350,- Kč, elektronicky 190 Kč, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5

Literatura Foiro: 1500,- Kč (1000,- Kč pro členy „Esperanta Civito“), 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (elektronicky nevychází)

La Ondo de Esperanto vychází pouze elektronicky ve třech kategoriích:

- 1. Abonanto – 400 Kč**
- 2. Amiko – 800 Kč**
- 3. Patrono – 2600 Kč**

La Ondo de Esperanto

Abonanto 15€ / Amiko 30€ / Patrono 100€



Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
57. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
<http://www.esperanto.cz/starto>

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 300 Kč
Členská evidence a změny adres:

p/a Mgr. Andrea Švubová, DiS,
svubova@esperanto.cz

Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2026

--

Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 57-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 13 eŭroj, ekster
Eŭropo 15 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

<http://www.esperanto.cz/starto>

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva
numero: 7.5.2026

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.

KALENDARO 2026

2026-03-29 Marcipana Pasko Svitavy

2026-04-11 Sabla Printempo en Písek
pisek@esperanto.cz

2026-04-15/18 Lingva Seminario en Pacov
zemamka@seznam.cz

2026-05-22/24 Ĉeĥa-germana renkontiĝo en
Olomouc, komitato@esperanto.cz

2026-06-21 Internacia infana kanto, Svitavy

2026-06-21 Inaŭguro de ekspozicio en la E-
Muzeo Svitavy pri UK, svitavy@esperanto.cz

2026-06-21 Renkontiĝo sur la monto Ĉantorio
rondeto@centrum.cz

2026-07-20/30 47-a Renkontiĝo de E-familioj
en *Kaprálův mlýn* kunlabore kun Verdaj
Skoltoj, familioj.miraheze.org/wiki/REF

2026-08-14/16R Renkonto de ekstendaranoj en
Lančov, let.lancov@seznam.cz

2026-09-25/28 Konferenco de ĈEA en
Poděbrady, komitato@esperanto.cz

EKSTERLANDE (Elektio laŭ [Eventa Servo](#))

2026-03-14/21 Mediteranea Esperanto-
Semajno, Les Issambres, Francio

2026-04-17/26 PRINTEMPaS: intensivaj
kursoj kaj ekzamenoj, Grésillon, Francio

2026-05-23/30 77-a IFEF-kongreso en Mokra
Gora, Serbio

2026-05-25/02-01 Bibliaj Tagoj en Sankt Goar,
orienta Germanio, Rejnlando-Palatinato

2026-05-29/31 37-aj Esperantaj Tagoj de
Krakovo, Pollando

2026-07-19/26 99-a kongreso de SAT en León,
norda Hispanio

2026-07-23/27 Pola E-Kongreso, Bialsko-Biala,
Pollando (landlime kun Ĉeĥio)

2026-08-01/08 111-a Universala Kongreso en
Graz, Aŭstrio, Info: <https://uea.org/kongresoj>

2026-08-08/15 Kristana Kongreso 2026 en
Görlitz, orienta Germanio

2026-08-09/16 82-a Internacia Junulara
Kongreso en Tiana, Katalunio

2026-08-22/29 92-a Itala E-Kongreso, Vico
del Gargano, Foggia, Italio

2026-09-24/28 Beneluxa Kongreso, De Haan

2026-10-18/23 14-a E-Migrado Aŭtuna,
Naundorf, Germanio – landlime kun Ĉeĥio)



Marcipana Kristnasko en nia muzeo



Antaŭkristnaska kolbasumado en Lepsiko



Meksika gastino Xochitl Yin en nia muzeo



Zamenhof-festo en Prago



Rememore al Rob kaj Roman: 5 honoraj membroj de UEA dum la UK en Brno:
R. Dobrzyński, H. Tonkin, P. Chrdle,
B. Rozenfelde kaj R. Moerbeek
kun la UEA-prezidanto F. Maia



Zamenhof-tago en Vieno